

# TEA-BULTENO

23<sup>A</sup> JARO - N° 152

MAJO-JUNIO

N. 5-6/2020

Feliĉo estas la sola afero, kiun oni povas donaci, eĉ se oni ne posedas ĝin.  
*Élisabeth Leseur, franca mistikulo (1866-1914)*

## Kara Legantaro!

Alvenis jam la plej belaj monatoj de la jaro, kiam temperaturo ankoraŭ mildas, dum la Naturo plenfloras, diseligante en la aeron siajn plej dolĉajn aromojn kaj pentrante akvarele per riĉo da buntaj koloroj.

Ho ve! Ĉion ĉi por la momento tute ni ne povas ĝui pro la nepetita alveno de la kronvi-

ruso. Tamen mi ne intencas paroli pri ĝi kaj ties ĉi fiagoj: ja ni ĉiuj estas daŭre sub ŝtormego da informoj, anoncoj, statistikoj, konfirmoj kaj malkonfirmoj, veraĵoj kaj malveraĵoj... Sufiĉas, nia kapo ja plenplenas je tiaĵoj.

Kio momente tre gravas por mi estas scii, ke vi bone fartas, kaj krome, ke vi profitis de ĉi neantaŭvidita paŭzo por

labori **per, pri, por** kaj **pro** Esperanto. Bonege, ja mi aŭdas viajn laŭtajn JES-ajn respondojn! Tial mi demandas: ĉu vi pretas legi, kiel estas la esperanta nomo de tiu ĉi besteto teruriganta la tutan mondon? Probable vi jam mem formis ĝin, sed okaze de dubo, ĉi sube vi trovos la konfirmon - aŭ ne - pri la *el-ektita* termino. **E-D**

## Kronviruso aŭ koronaviruso aŭ...


Tiu viruso estas la sola afero pri kiu ni ĉiuj parolas kaj pensas de semajnoj.

Sed kiel ni nomu ĝin en Esperanto? La medicinistoj preferas la terminon *koronaviruso*, ĉar tio estas ĝia internacia teknika nomo, uzata en multaj lingvoj kun la sama formo (tamen laŭ la aparta skribsistemo de la koncerna lingvo). Fakte ekzistas multaj specoj de viruso, ekzemple *enteroviruso*, *rinoviruso*, *rotaviruso* kaj aliaj. La viruso, kiu nun kaŭzas la tutmondan epidemion, apartenas al la familio de la koronavirusoj, sed ekzistas multaj aliaj specoj de koronaviruso, kiuj povas kaŭzi ankaŭ nur simplan malvarmumon.

Se vi volas uzi tiun teknikan terminon, notu, ke *koronaviruso* estas unu vorto. La unua parto *korona-* aspektas kiel adjektivo, sed fakte ĝi estas parto de la radiko. La vorto estas ne-dividebla.



Intertempe, tamen, la esperantistoj, kiuj plejparte ne estas medicinistoj, diskutas kiel nomi tiun viruson en Esperanto. *Corona* estas la latina vorto por "krono" (la kapvesto



portata de reĝo aŭ reĝino), do multaj esperantistoj nomas ĝin *kron-viruso*.

La membroj de la Akademio de Esperanto diskutis, kiel nomi tiun viruson en Esperanto. La plejmulto estis egale dividita inter *kron-viruso* kaj *koron-viruso*. (La malgranda grupo de medicinistoj, aliflanke, preferis la teknikan terminon *koronaviruso*.) Finfine, do, la Akademio ne rekomendis unu el la du formoj, sed

anoncis, ke ambaŭ estas uzablaj. Nur post iom da tempo ni ekscios, kiu el la du formoj estas preferata de la plejmulto de la esperantistoj.

Ofte okazas, precipe rilate al sciencaj aferoj, ke por la sama afero ekzistas popola nomo kaj scienca nomo, ekzemple salo nomiĝas ankaŭ *natria klorido* (NaCl), kaj la floro miozoto nomiĝas ankaŭ *neforĝesumino* (ne-forĝesu-min-o).

Ankaŭ tiu viruso, pri kiu oni nuntempe parolas en ĉiu gazeto, ricevas sian popol-nomon en Esperanto, eĉ se ni ankoraŭ ne decidigis inter la du formoj. Kiam la krizo finiĝos, kaj ni



## Laste trovitaj!

De tempo al tempo neatendite impetas kontraŭ la okuloj iu rara poŝtkarto priesperanta, kiu pro sia eksterordinareco malpermesas al oni preteratenti ĝin. Jes, ĉi-foje mi estis vere bonŝanca: interesega kaj fronte kaj malfronte. Kio kaptis tuj mian atenton estis la skribaĵo maldekstrangule:

“ ESPERANTO ”

La piŭ facile e razionale delle lingue

PO. JAKOBO BIANCHINI

Fontanafredda (Pordenone)

(Udine - Italujo)

10-10



Sendodato: 25<sup>an</sup> de oktobro 1910. Adresito: iu s-ro H. F. Adolf Thalwitzer el Dresdno, Germanujo. Malmulte mi sukcesis scii pri tiu ĉi esperantisto. Certas, ke li estis eldonisto, en Kötzschenbroda, apud Dresdno, ke antaŭ 1908 li esperantistiĝis kaj probable li estis medicinisto, ĉar foje lia nomo estas antaŭita


de 'd-ro' kaj krome li estis membro de T.E.K.A. - Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio - kaj zorgis ankaŭ pri ties ĉi organo *Voĉo de Kuracistoj*, ekde 1911. Ĝin li redaktis nur du jarojn, ĉar poste li translokiĝis en Afrikon.

Sur la malantaŭo de la karto kaligrafio eta, iom malorda, malfacile deĉifrebla plenigas ĉian spacon. Tamen ĝi estas - miaopinie - tre interesa ankaŭ ĉar ĝi rilatas al regiono Friulo. Por malŝpari al vi la strebon klopodi kompreni la tekston, mi kopiis ĝin por senproblema legado.

Tamen, antaŭ ol tion fari, pli bone estas konatiĝi kun ĝia aŭtoro, nome pastro Jakobo Bianchini. Li naskiĝis en Carbona [Karbona] de San Vito al Tagliamento en 1875, friula urbeto. Notindas, ke en San Vito havis sian Esperanto-eldonejon Antonio Paolet, kies libroj - vortaroj, gramatikoj, tradukaĵoj de italaj aŭtoroj - ludis gravan rolon por la itala E-movado. Sed tio ĉi estas alia historio.

J. Bianchini pastrigis en 1903, renkontis Esperanton en 1905 kaj publikigis sian unuan E-verkon *Hebrea Kalendaro* en 1906. En Vieno, 1908, li renkontis L. L. Zamenhof-on. Fariginte membro de IKUE\*, li ekkunlaboris en la redaktado de la katolika revuo *Espero katolika*\*\*.

Okaze de la 4<sup>a</sup> Internacia katolika kongreso en Romo (1913) kune kun ĉiuj ĉeestantaj esperantistoj li ricevis la apostolan benon de Papo Pio 10<sup>a</sup>, kiu favoris la disvastigadon de la lingvo tra la mondo. Dum tiu kongreso li estis elektita unuanime



→ ĉiuj rajtos reiri al normala vivo, ni ne plu bezonos tiun vorton, kiu rilatas al nuntempa aktualaĵo. Tiam la sciencistoj denove povos paroli inter si pri la *koronaviruso*, uzante sian preferatan sciencan terminon.

### Anna Löwenstein

Estas redaktoro de *uea.facila*, kaj ankaŭ verkinto de du romanoj en Esperanto. Ŝi estas brita, kaj loĝas en Londono.

En la paĝaro Esperanto.cs, ĉe la rubriko **aktualaĵoj** eblas elpreni tre ĉarman pdf-aĵon pri **Kronĉjo la viruso**, klarigita al infanoj. Tre simpatia, plaĉe priskribita, taŭge simpla por niaj etuloj, per kies helpo gepatroj aŭ geavoj povos komprenigi la aktualan situacion provokatan de tiu besteto. Ĝi estas libere elŝutebla: dankindas la aŭtoroj kiuj disponigis tiel facilan metodon por instrui niajn infanojn.

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/superrigarde-pri-la-kronvirusa-pandemio-en-esperanto-kaj-rilate-al-esperantujo-1.html>

## Kronĉjo La viruso

la kronviruso klarigita al infanoj

**Viruso** estas eta ne okulvidebla afero, kiu multobliĝas instaligante en la korpo de homoj.



ĝi eniras ĉi tien...  
...kaj kaŝiĝas tie

ĝi estas tiel eta, ke ĝin oni povas vidi nur per elektrona mikroskopo! Imagu...



varma, humida...  
kiel agrable ĉi tie!

© margueritedelivron Texte: Paul de Livron



➔ ankaŭ ĝenerala sekretario de IKUE, malgraŭ sia deziro aldirita ke pro sia troa okupiteco li ne povas surprēni kromajn taskojn. En tiu sama jaro aperis alia libro, la *Lernolibro de itala lingvo*, en Esperanto por lerni la italan. Inter 1914 kaj 1915 estis eldonitaj la *Tutmonda adresaro de katolikaj esperantistoj* kaj *Tiu de la latina lingvo*, t.e. la gramatiko de la latina lingvo en Esperanto. Do, la tre laborema kaj aktiva pastro Bianchini klopodadis ĉiel disvastigi la internacian lingvon inter la katolikaro. Krom esti elstara studemulo, li bone regis, ne nur la latinan kaj grekan, sed ankaŭ la hispanan, germanan kaj francan lingvojn plus - kompreneble - la friulan dialekton.

En 1934, malgraŭ la faŝisma diktatoreco kiu multe subpremis kaj malhelpis la laboron de esperantistoj, kun seriozaj malfacilaĵoj pro renkontitaj malpermesoj aperis aliaj liaj verkoj, inter kiuj *Cursus Completus Esperanti*, kurso pri esperanto en la latina, kaj, pli malfrue, *Malgranda katolika katekismo originale verkita en esperanto*.

Je la fino de la 2<sup>a</sup> mondmilito en iu apuda vilaĝo li fondis E-Grupon, konsistantan el pluraj junuloj laborantaj precipe en la sociala kampo. Notindas, ke Jakobo Bianchini estis unu el la fondintoj de la Esperanto-Katedro en Italujo (1912); konvinkis Antonio-n Paolet dediĉi sin al Esperanto (1912); kune kun Achille Tellini, li kontribuis al starigo de la Filologia friula societo (1919). En internacia kampo, li fariĝis Lingva Komitatano jam en 1909 kaj poste membro de la Akademio (1951).

Li pasigis sian tutan vivon en Friulo, praktikante la pastran oficon dum 50 jaroj en diversaj urbetoj, ĝis kiam en 1927 li iĝis parokestro en Cimpiello, [Ĉimpiello] kie li mortis en 1954.

Fine ni observu la tekston aperantan en la dorsa flanko de la poŝtkarto. Kiel videblas, ne facilis la legado, sed per lupeo kaj multa pacienco mi sukcesis kompreni. Temas pri artikolo verkita de J. Bianchini por la revuo *Internacia Scienca Revuo*, sendita de Fontanafredda, 25<sup>an</sup> de oktobro 1910. La titolo estas:


**Friulano kaj Esperanto.**

*Friulano estas lingvo tre antikva kiun parolas preskaŭ 800,000 homoj de la nord-orienta Italujo. Ĝi ŝajnas al mi tre interesa por esperantistoj ĉar ĝiaj verboj finiĝas infinitive ĉirk-aŭ unu triono per -i. Jen specimeno de plej*

**Notoj:**

\* IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista  
 \*\* Espero Katolika estas katolika E-revuo, eldonita de IKUE. Ĉar ĝi unua eldoniĝis en 1903 kaj plu estas eldonita (kun interrompoj dum la du mondmilitoj), ĝi estas la plej malnova gazeto daŭre aperanta ĝis hodiaŭ. Ĝia fondinto estis la pastro Emile Peltier, el Tours, Francujo, kiu la unuan numeron eldonis en oktobro 1903.

*similaj al Esp. kolektitaj de mi en 30 paĝoj de unu el niaj verkistoj.*



<u>Friulano</u>	<u>Esperanto</u>	<u>Friulano</u>	<u>Esperanto</u>
aĝi	agi	viesti	vesti
atindi	atenti	vinci	venki
bati	bati	vivi	vivi
credi (legu kredi)	kredi	cuĝi (kuzi)	kudri
crodi (legu krod)		aldonu vortojn havantaj multnombrojn per J - ???	
cori (kori)	kuri		
cuviarzi (kuviarzi)	kovri	vôj	okuloj
dî	diri	viej	maljunuloj
finî	fini	miej	miaj
gloti	gluti	tiej	ciaj
ĝholdi (ĝoldi)	ĝui	siej	siaj
intendi	intenci	Tiu ĉi fakto estas mirinda, konsiderante ke D-ro Zamenhof neniam vidis friulanon, kies literaturo estas malgranda.	
lei	legi		
luzi	lumi		
meti	meti		
murî	morti		
naŝi	naskiĝi	Aliaj verboj finiĝas per à kiel mangà mangî, volè voli, ktp.	
pierdi	perdi	..... N.d.r.: ??? signifas ke mi ne kapablis deĉifri la vorton.	
plovi / pluvi	pluvi		



## Ankoraŭ pri Plasto...

Antaŭ kelke da tagoj ŝokis min artikolo aperinta en ĵurnalo, kiu informis, ke dum unu semajno ni englutis, manĝe kaj trinke, po 5 gramojn da mikroplasto. Tio konkrete egalas



al pezo de kreditkarto erigita. Summe dum la jaro ĉirkaŭ ducent kvindek gramoj travagadas nian organismon, tute senĝene, kaŭzante... ankoraŭ ne sciatas, kiuj estas la efektoj sur la sanon.

Verdire tio min maltrankviligis, sed ne tiom por mi mem, kiu jam havis la tempon *ensorbi* sian destinitan kvanton, sed por la junaj generacioj, kiuj ekde sia naskiĝo vivas trempitaj en mondo plenŝtopita per plasto. Ĉu vi memoras pri la vastegaj oceanaj plasto-insuloj? (ndr: vidu *Tea-Bultenojn 143-144-145 - 2018*). Nu, la homa korpo fariĝis plastujo.

Esploroj pri mikroplasto estis komisiitaj de WWF al Universitato de Newcastle, Aŭstralio: la fina ellaboraĵo, scienca revizio de la antaŭaj 52 studoj pri la temo, unua pritraktis la pezon de la mikroplasto enirintaj organismon, tre grava paŝo por kompreni la efikon de tiuj ruboj sur la estaĵojn.

De kie venas tiuj partikloj? La plej granda parto el la enboteligita akvo aŭ de tiu el kranon. Inter la plej poluitaj elementoj ŝajnas esti ankaŭ la duvalvuloj (mitulo, ostro k.s.), biero kaj salo. Pri la duvalvuloj, la problemo estas ke oni ilin manĝas en ilia kompleteco, inkluzive de la digesta aparato: ĉar ili vivas en malpura maro, sekve eniras la homan korpon ĉ. 120 plastaj eroj ĉiusemajne. Por ne igi vana ĉi profundan serĉadon, urĝa neceso estas serioze komenci – kiel unua paŝo – redukti, se ne elimini, la plaston konsumadon, tiel ke oni ne

plu poluadu la ekosistemojn. Sed kiel? Aktuale ŝajnas maleble eviti ĝian uzadon. Nur tutmonda interkonsenta agado povus alfronti tiun ĉi danĝeron, sed... La komuna celo devus esti: *Nenia plasto en la naturo: taksu la englutadon de plasto, de la naturo al la homoj.*

Tamen la problemo rilatas ne nur la homon (kiu estis la kaŭzo de la fia malbono!), sed ĝi grave minacas la pluekzistadon de la sovaĝa faŭno, ne nur pro la englutado de tiu materialo, sed pro la detruado de ĝia vivmedio: tio povus kuntreni neimageblajn konsekvencojn.

Mi mem kredas, ke bedaŭrinde nek akvo, nek biero, nek salo, nek duvalvuloj estas la nuraj *liverantoj* de mikroplasto: sufiĉas pensi pri la ĉiutaga rutino. Matene ni purigas niajn dentojn per freŝiga pasto: la dentobroso kaj pastujo konsistas el plasto. Poste ni matenmanĝas: trinkas kafon kaj/aŭ lakton, ĉi lastan ni elverŝas el plasta botelo, manĝetas iom da fromaĝo, envolvita en plastaĵo, kaj gustumas jogurton en plasta vazeto... Ĉu mi daŭrigu?

Nur unu afero certas, ke la plasto, kiu enŝteliĝis en nin mem, ne estas demovebla, ĝi restados kun ni ĝis ... nia fino! Solvon kompreneble mi ne kapablas doni, sugestebles formiĝo de premgrupo (*kia utopio!*) por skui ĉiujn ŝtatojn, por ke tiuj vekiĝu kaj komencu ripari ĉi eko-katastrofon, antaŭ ol estos tro malfrue.

Kion povas fari unuopulo? Malmulton, tamen eĉ tiu malmulto povas utili al ĉiuj. Do, konsilindas, anstataŭi - kiam eblas - la plaston per taŭgaj ujoj el metalo aŭ vitro, ne elmeti plastaĵojn apud varmfontoj aŭ ĥemiaj agentoj aŭ sub la suno, ne konservadi oleon aŭ grasajn manĝaĵojn en plastujoj, ne uzadi tiujn travideblajn foliojn por manĝaĵoj kaj precipe ne kovri telerojn aŭ aliajn ujojn kies enhavon oni intencas varmigi en mikroonda aparato ktp.

Nur kelkaj sugestoj, kiujn certe vi jam konas... ho, mi forgesis – atentu pri limdato! Mi atendas viajn konsilojn! Sed tutunue, for la plaston!!!

Adaptis kaj trad. ED

il fatto alimentare <https://ilfattoalimentare.it/>

→	Friulano	Esperanto	Friulano	Esperanto
	ridi	<i>ridi</i>	tignì ( <i>tiñi</i> )	<i>teni</i>
	rispuindi	<i>respondi</i>	vendi	<i>vendi</i>
	regi	<i>regi</i>	vignì ( <i>viñi</i> )	<i>veni</i>
	scrivi ( <i>skrivi</i> )	<i>skribi</i>	viodi	<i>vidi</i>

*Gramatiko, ekzercoj, vortareto Friulano-Esperanto estas nun en presado. Sin turni al S-ro Claudijs Colas, Rue d'Angaulême 20 Paris.*

Tiel ĉi finiĝas la artikolo por Internacia Scienca Revuo, skribita en 1910 de Jakobo Bianchini, kiu dediĉis sian tutan vivon al pastreco kaj al esperanto. *ĜDO*

## Aforismoj



La homoj naskiĝas nesciantoj, ne stultuloj; malsaĝeco estas rezulto de edukado.

Kial refari la malnovajn erarojn, kiam estas tiom da novaj fareblaj?

La problemo de la homaro estas, ke la malsaĝuloj estas ekstreme memfidaj, dum la inteligentuloj estas duboplenaj.

*Bertrand Russell, scienca filozofo, matematikisto, moralisto (1872-1970)*



## Kio novas en Esperantujo?

Multas la novaĵoj pro la konata invado de kronvirusoj, kiuj bedaŭrinde ofte rilatas al nuligo de kongresoj, konferencoj, seminarioj, renkontiĝoj ktp ktp. Esperantistoj tamen estas tre iniciatemaj kaj, danke al la teknologiaĵoj uzataj de la plej granda parto de nia samideanaro, sukcesas disponigi virtualajn surgatojn de tio kio nun ne estas fizike realigebla.

Do, sufiĉas iom navigi kaj ĉio estas je via ... alklako! Kelkajn sugestojn mi plezurdonas al vi:

### **ILEI-Strategio: Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo.**

En la retejo [www.ilei.info](http://www.ilei.info) vi trovas la kompletan programon, inkluzive la **leteron**, kiu iru al decidantoj pri edukado je ĉiu nivelo (urba, provinca, kantona, ŝtata): lernejestroj, instruistoj, lingvoinstruistoj, gazetoj por instruistoj, sindikatoj por instruistoj, lertigejoj por instruistoj, universitatoj, lingvocentroj, aŭtoroj de lernolibroj, eldonistoj de lernolibroj, institutoj, kiuj okupiĝas pri edukado, plurlingvismo k.s. Jam nun ni prepariĝu por la onta lernoĵaro, kiu komenciĝos (espereble!) en septembro ĉj. Ĉio pri la iniciato troviĝas en la jena ttt-ejo:

<https://www.ilei.info/agado/projektoj.php>

### **GRAVAĴO!**

#### **KOVIM-19 KAJ MINORITATOJ**

UN en Ĝenevo publikigis en Esperanto mesaĝon de speciala raportisto

**La timoj ligitaj al la KOVIM-19 ne estu ekspluatataj por ataki kaj ekskludi la minoritatojn** - diras fakulo de UN.


Varme mi konsilas viziti la retejon kaj legi la enhavon de la prezento de tiu ĉi problemo.

Ĝi aperas ankaŭ en Esperanto en la retejo de UN/AKHR (Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj): [www.ohchr.org/EN/NewsEvents/Pages/DisplayNews.aspx?NewsID=25757&LangID=E](http://www.ohchr.org/EN/NewsEvents/Pages/DisplayNews.aspx?NewsID=25757&LangID=E) (tradukis el la franca originalo al Esperanto Stefano Keller, ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo.)

La raporto estas de d-ro Fernand de Varennes, de jaroj kunlaborema kontaktpersono de UEA ĉe UN en Ĝenevo, juristo kaj fakulo pri lingvaj rajtoj, kiu nun okupas tiun altan funkcion ĉe UN kiel Speciala Raportisto pri minoritataj aferoj. Li estas en rekta kontakto kun la ĉefrepresentanto de UEA en Ĝenevo kaj UEA invitas al ĉiuj Esperanto-parolantoj diskonigi tiun mesaĝon kiel montron de bonvolemo kaj kunlaboro kun UN kaj UN-kontribuantoj.

**52<sup>a</sup> Malferma tago okazis virtuale:** eblas vizito de la Centra Oficejo ĉe jena retadreso

[https://www.youtube.com/playlist?list=PLfeb4d4xxn3CPxaY4q1IZnVdwXUJ3\\_mER-](https://www.youtube.com/playlist?list=PLfeb4d4xxn3CPxaY4q1IZnVdwXUJ3_mER-),



kie libere spekteblas sep videoj, ĉiuj tre interesaj. Jen la titoloj:

**Spertoj** pri tradukado kaj interpretado; **Speciala prelego** Burunda teo; **Esperanta mondliteraturo**, kiel mi povas kontribui; **Speciala prelego** *Sin nutri en la naturo*; **Komparo** inter du planlingvoj; **Speciala prelego** TEO.

**UEA 112-jara: ĝi estis fondita de Hector Hodler en 1908**, kiam li estis nur 21-jaraĝa.

Ĉi-jare oni honorigis la centjariĝon de lia forpaso. Lia juneca entuziasmo kaj liaj pensoj ankaŭ instigu teni nian flamon. Omaĝe al li UEA publikigis specialan komunikon (<https://uea.org/gk/859a1>) kaj liberigis la elŝuton de la aprila numero de la revuo *Esperanto* [https://uea.org/l/?prenu=eo\\_apr20](https://uea.org/l/?prenu=eo_apr20) al ĉiuj interesoatoj.

**Nuligo:** Ankaŭ la 21<sup>a</sup> Alp-



Adria Esperanto-Konferenco, kiu devintus okazi komence de junio en Rijeka, Kroatio, estas nuligita kaj prokrastita en anoncota dato. Al la organizantoj, kiuj fervore kaj vigle estis preparantaj interesege renkontiĝon la triesta AA-sekretario,

Edvige Ackermann, sendas dankan saluton kaj ĝisrevidas je kiel eble plej baldaŭ.



\*Parkour = Parkuro (el la franca), kromnomata "la arto de kurado", estas trejna disciplino, kiu uzas moviĝojn origine venintajn el armea barilkureja trejnado.

Vinjeto de Eraldo Sepulcri, triesta grafikisto - 2018

# Novaj libroj por infanoj

# Spaco sur la balail'



Rakonto pri ĝentila sorĉistino kaj ŝia kato, kiuj invitas hundon, birdon kaj ranon kunvojaĝi kun si per balailo. Subite okazas neatenditaĵo!

Verkis Julia Donaldson, ilustris Axel Scheffler. Tradukis Ian Carter, kun helpo de Edmund Grimley Evans kaj Tim Owen.

Eldonis en 2020 Esperanto-Asocio de Britio. 25cm x 28cm x 0,4cm, 32 paĝoj.

La prezo por unu libro estas 5 funtoj (5,80 €) + sendokostoj, proksimume po 7,50 €.

## Uno per tutti ... cinque per mille! AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO!

Il 5 per mille dell'IRPEF  
all'Associazione Esperantista Triestina ODV  
**Associazione di volontariato**  
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni di legge, possono destinare il **5 per mille delle imposte** a sostegno delle Associazioni di **VOLONTARIATO**.

**La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.**

È sufficiente indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella per il VOLONTARIATO nel momento in cui si effettua la dichiarazione dei redditi (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc).

**Il codice fiscale da indicare è il seguente:**


**90012340320**

Invitiamo perciò amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi questo numero di Codice Fiscale.

**GRAZIE!!!**

## Atentigo!

Kiam eblos denove kunveni en nia TEA-sidejo, ĉiuj estos tuj kontaktitaj!  
Ĝis la revido kiel eble plej baldaŭ!  
La TEA-Estraro



## Mil Unuaj Vortoj

estas trezoro da lernigaj ebloj por ĉiuaĝaj infanoj kaj ankaŭ por plenkreskuloj! Ĝi estas fascina paroliga libro por helpi eklegi Esperante, kaj fonto de ideoj por konversacio.

La intenco estas, ke gepatroj kaj instruistoj uzu la libron por interesi la lernantojn per

trovo de la objektoj en la bildoj kaj la vortoj ĉirkaŭaj. Tio kondukos al vigla konversacio pri la situacioj en la bildoj. Ekzemple: Trovu la anasidon! Kiu trinkas lakton? Kion faras la hundo? Kaj tiel plu.

Ĉi tiu tria eldono alportas freŝan vivon al ĉi tiu tre populara libro. La bildoj kaj etiketoj nun inkluzivas objektojn, kiuj aperis en la ĉiutaga vivo nur en la lastaj jaroj. La ilustraĵoj de Stephen Cartwright, el kiuj kelkaj estas tute novaj, donas per siaj abundo da detaloj kaj ludema aliro horojn da valora distrado kaj utila amuzo.

Ĉi tiu libro estas disponata en diversaj lingvoj, tiel donante mirindan lerneblecon por junaj lernantoj de fremdaj lingvoj, kaj por iu ajn, kiu deziras la stimolon de lernado per bildoj.

La prezo por unu libro estas 5 funtoj (5,80 €) + sendokostoj, proksimume po 7,50 €.

**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO ODV**

**Redaktanto:** Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

**Sidejo/Poŝta adreso:** Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

**Kunventagoj:** marde 18-20; vendrede 19-21

**Tel:** (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936

**Banka Konto:** Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

**Reto:** esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it

**Asociaj ttt-ejoj:** www.esperantotrieste.altervista.org;

www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org